# TEJO-aktuale: numero 386, 2014-04-10

### [tejo] Alloga propono. Ĉu vi estas muzikema, kantema persono, havanta liberajn tagojn en julio?

Ĉu vi ŝatas kanti, eble eĉ ludas instrumenton, kaj serĉas senpagan ferion kun muziko kaj Esperanto, en Svedio, estas E-parolanto kaj havas liberan tempon dum la dua semajno de julio 2014? Se tiuj kondiĉoj konformas al via situacio kaj vi interesiĝas pri partopreno, bv. skribi al studenta.scienca.esp.rondo (ĉe) gmail.com (aŭ al esperanto.instruado.jag.univ.pl (ĉe) gmail.com) por ricevi pli detalajn informojn. Amike, Maria Majerczak.

### Esperanto-Tago, 26a de julio, alproksimiĝas!

Informu viajn lokajn radio-staciojn, televidon kaj gazetaron pri Esperanto-Tago. https://www.youtube.com/watch?v=siVZPQ7c4xA

Ankaŭ distribuu afiŝojn pri la tago, ekzemple en lokaj bibliotekoj ktp http://www.gazetaro.org/esperanto-tago/index.htm

Kiel kutime, ĉiam antaŭen, Brian (esperanto.tago ĉe gmail.com).

P.S. Se la teksto ne ekzistas en via lingvo, bonvole sendu al nia desegnisto, Peter Oliver rete – (peteroliver ĉe wanadoo.fr)

### Svisa Feria Esperanta Renkontiĝo (SFERO), Vordemwald, Argovio, Svisio, 17-an ĝis 19-an de oktobro 2014

Mi ja antaŭĝojos revidi vin multnombre en Centro Adionia en Vordemwald, Argovio, dum la venonta SFERO la 17-an ĝis 19-an de oktobro 2014, kie la sabaton 18-an de oktobro ankaŭ okazos la finalo de la 1-a Svisa Esperanto-Junularo-Kantokonkurso. Helpu al la sukceso de tiu-ĉi konkurso, disvastigante la informojn pri ĝi al ĉiuj eblaj kandidatoj (junuloj inter 14 ĝis 25 jaroj). Pliaj informoj pri la konkurso sub http://esperanto.ch/konkurso

### KVAR IKU-PRELEGOJ EN LA RETA KINEJO

Kvar filmitaj prelegoj de la Internacia Kongresa Universitato en la 97-a UK en Hanojo en 2012 aldoniĝis al la kolekto de la Reta Kinejo de UEA en YouTube. Ĉiuj filmoj estis realigitaj de Francisco L. Veuthey.

Du prelegoj temas pri arto. Sub la titolo Movado aŭ kulturo? (53’) prof. Humphrey Tonkin traktas la ideologian bazon de la Esperanto-poezio, dum Jonathan Cooper parolas pri Moderna arto: kio ĝi estas kaj de kie ĝi venas? (2-a parto, ambaŭ kune 51’). D-ro Jukka Pietiläinen havas ĵurnalistikan temon, Novaĵoj translimen (57’), sub kiu li analizas la geografian strukturon de internaciaj novaĵoj. Kiu kontrolas la registarojn de la mondo? demandas d-ro Gábor Márkus , priskribante mekanismojn en diversaj landoj por kontroli la funkciadon de ties registaroj.

En la retejo de IKU troviĝas listo de ĉiuj prelegoj, kies filmregistaĵo estas videbla en la Reta Kinejo. La tekstoj de la prelegoj estas publikigitaj en la t.n. IKU-libro. (Fonto:Gazetaraj Komunikoj de UEA, N-ro 540, 2014-04-10) Legu pli: http://uea.org/dokumentoj/komunikoj/gk.php?no=540#2

## 164 PARTOPRENIS EN LA TRIA TUTMONDA EKZAMENTAGO

La 14-an de junio, per la parola ekzamensesio en la brazila urbo Kuritibo, finiĝis la Tria Tutmonda Ekzamentago, en kiu partoprenis 164 personoj en 17 urboj en 12 landoj (detala statistiko haveblas en la retpaĝo).

En kvin lokoj okazis ankaŭ parola parto. Pasintjare ĝi jam okazis en Arras, La Chau x-de-Fonds, Limoges kaj Tecamac, dum ĉi-jare Curitiba unuafoje provis la novteknologian manieron realigi ĝin.

En junio kaj julio okazos la korektado kaj taksado. La atestilojn oni planas enmanigi dum la UK en Bonaero rekte al la ĉeestantaj sukcesintoj aŭ al la reprezentantoj de la ekzamenlokoj. Se ĉiuj ekzamenitoj sukcesos, la nombro de ĝisnunaj sukcesintoj atingos 1446 kaj la ronda nombro de 1500 povos esti atingita ĝis la fino de tiu ĉi jaro.

En julio kaj aŭgusto okazos tri ekzamensesioj.

(Laŭ edukado.net)
(Fonto: Gazetaraj Komunikoj, N-ro 545, 2014-06-28) Legu pli: http://uea.org/dokumentoj/komunikoj/gk.php?no=545

## Resumo pri la somero en kastelo Greziljono

- Sennacieca semajno alternativa -- 2014-aŭgusto-1/9

KURSOJ: Korea natura medicino. Paroligo. Cseh-metodo.

PRELEGOJ: Pentrarto. Situaco en Irano. Ekonomio ĝenerale. Monda demokratio. Korea kulturo. Saniĝo per spiritaj fortoj.

ATKIVAĴOJ: Kuracado per farunoj. Tajĝiĉuano. Ekskurso al Luar-kasteloj. Teatraĵoj kaj skeĉoj. Libroservo. Biciklado.

Detaloj en http://www.gresillon.org/s3

- Festa Semajno por infanoj, junuloj, familioj -- 2014-aŭgusto-9/17

AKTIVAĴOJ: Farado de manpupoj. Trezorserĉoj. Gimnastiko. Manlaboroj. Kanzon-kantu. Banado en lagoj

KURSOJ: Cseh-metodo. Ludu ni por paroli. Libroservo

DISTRAĴOJ vespere: Folk-balo kaj koncerto de Kapriol'. Vojaĝo tra Brazilo. Mutaj filmoj

Detaloj en http://www.gresillon.org/s4

Resumo pri la somero en kastelo Greziljono: http://www.gresillon.org/somero

### TORPEDO 9: Herzberg im Harz, die Esperanto-Stadt, Germanio, 3a ĝis 5a de oktobro 2014

Post unujara paŭzo (pro la ILEI-konferenco en julio 2013) denove okazos la Tradicia Oktobra Renkonto Pedagogia en Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo. La celo estas pluklerigado per fakprelegoj, traktado de interesaj fakaj temoj, diskutado pri tendecoj, ebloj, novaĵoj de instruado de fremdaj lingvoj, ebligo de spertinterŝanĝo al gekolegoj, helpo per metodikaj-didaktikaj konsiloj al la malpli spertaj gekeolegoj, ktp.

Ĉeftemo: Libroj – Bildoj – Filmoj. Instruado per modernaj metodoj al moderna klientaro.

Kotizoj: 30 EUR (EGS-membroj), 45 EUR (GEA-membroj), 60 EUR (sen membreco), sen kotizo por GEJ-membroj. Aliĝu al TORPEDO 9 ĝustatempe!

TORPEDO estas organizata jam la 9-an fojon de AGEI kaj Germana Esperanto-Centro – Filio de GEA por Klerigado kaj Kultruo kaj la partopreno en ĝi kalkuliĝas ankaŭ kiel studmodulo en la klerigsistemo, do eblas akiri kreditpoentojn.

Detaloj pri la klerigofertoj, studmoduloj: http://ic-herzberg.de/page.php?pid=81093452

La interesaĵo de la ĉi-jara pedagogia-metodika seminario estos la tiam okazonta Herzberga Esperanto-Filmfestivalo la 4-an de oktobro, ekde la 19-a horo en la Kavalira Salono de la Welf-kastelo, en kiu pluraj etfilmoj, videaĵoj estos prezentataj ne nur por Esperanto-partoprenantaro, sed ankaŭ por germanlingva publiko. La spektantoj mem prijuĝos la filmojn kaj la plej bonaj en la konkurso ricevos valorajn premiojn.

### [ret-info] Novaj libroj en la Scienca kaj Teknika E-Biblioteko, STEB

*Malsukcesa elŝuto.*

### Kultura seajnfino de CDELI kun André CHERPILLOD, La Sagne (NE), Svisio, Sabato-dimanĉo, 6-7 septembro 2014

Rezervu vian semajnfinon kaj frue prizorgu tranoktadon en La Sagne aŭ en La Chaŭx-de-Fonds. Ne atendu longe, ĉar temas pri turisma sezono!

Detala programo aperos baldaŭ en la paĝo: http://www.cdeli.org/Eventoj-de-CDELI.html

La evento-loko kaj hotelo: http://www.lasagne.ch/index.php?id=32008

### Venontaj renkontiĝoj

Somera Esperanto-Studado 2014, Nitra, Slovakio, 12a ĝis 20a de julio, http://ses.ikso.net

Karioka Renkontiĝo (KoRo), Rio de Ĵanejro, Brazilo, 14a ĝis 18a de julio 2014, http://koro.brazilo.net/ aŭ http://tinyurl.com/koro-rio

70a IJK 2014, Fortalezo, Brazilo, 18-a ĝis la 25-a de julio 2014, https://www.facebook.com/ijk2014 aŭ http://ijk.brazilo.net/ aŭ http://www.tejo/ijk

Semajnoj de Esperanto-Perfektigo (SEP) - intensaj lingvokursoj kaj instrukapabliga, metodika trejnado, klerigado. 65a Studsesio, klerigado en formo de blokseminario. STIPENDIOJ peteblaj!!, Herzberg am Harz, la Esperanto-urbo, Germanio, 19a de julio ĝis 3a de aŭgusto, http://esperanto-urbo.de kaj http://ic-herzberg.de

47-a ILEI-konferenco, Montevideo, Urugvajo, 19-a ĝis 25-a de julio 2014, http://ilei.info/

BEMI-karavano al IJS 2014, 20a ĝis 25a de julio 2014, https://www.facebook.com/events/267532046740714

12-a SOMERE, Dahlem-Baasem, Germanio, 23-a de julio ĝis 6-a de aŭgusto 2014, http://www.esperantoland.org/somere

25-a Internacia Junulara Semajno, Horány, Szigetmonostor, Hungario (nur 10 kilometrojn for de Budapeŝto), 25-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto, https://www.facebook.com/events/264440613710468 kaj http://ijs.hu/eo

99a Universala Kongreso, Bonaero, Argentino, 26a de julio ĝis 2a de aŭgusto 2013, http://uea.org/kongresoj

Sennacieca semajno kun kursoj, ekskursoj kaj prelegoj, antaŭ SAT-kongreso., Esperanto-kastelo Greziljono,

Grésillon, Francio, 1a ĝis 9a de aŭgusto, http://gresillon.org/s3

87-a SAT-Kongreso 2014, Dinano (Francio), 9a ĝis 16a de aŭgusto 2014, http://www.satesperanto.org/

Festa Semajno por infanoj, adoleskantoj, junuloj, familioj, SAT-Infankongreseto., Esperanto-kastelo Greziljono, Grésillon, Francio, 9a ĝis 17a de aŭgusto, http://gresillon.org/s4

24-a KISO (Kafoklaĉa Internacia Somera renkontiĝO) por „ludi, krei, sperti vin mem", Marburg, Germanio, 10-a ĝis 17-a de aŭgusto 2014, http://www.esperanto.de/kiso

Muzikrenkontiĝo FESTO, Pont-de-Barret (26), Francio, 16a ĝis 23a aŭg 2014, http://www.alesk.eu/festo2014/eo

Somera Esperanto-Studado 2014, Mendeleyevo, Rusio, 17a ĝis 25a de aŭgusto, http://ses.ikso.net

SUNO KAJ MONTOJ - 81-a Itala Kongreso de Esperanto, Fai della Paganella, Trento, 23a ĝis 30a de aŭgusto 2014, http://kongreso.esperanto.it

25-a MontKabana Renkontiĝo (MKR), Sillian, Aŭstrio, 18-a ĝis 21-a de septembro 2014, http://keja.hr/mkr/aliĝu-al-mkr/

Post-Somera Komuna Kuirado en Laarne (Belgio, iom sude de Gento), 19a ĝis 21a de septembro 2014, http://www.pskk.be/

Tria Interlingvistika Silmpozio, Poznano, Pollando, 25a kaj 26a de septembro 2014, http://www.staff.amu.edu.pl/~interl/interlingvistiko/simpozio2014.html

30-aj ARtaj KONfrontoj en Esperanto (ARKONES), Poznan, Pollando, 26a ĝis 28a de septembro, http://arkones.org

TORPEDO-9, 66a Studsesio (semajnfino pri Esperanto-instruado) + Esperanto-Filmfestivalo, Herzberg am Harz, la Esperanto-urbo, Germanio, 2a ĝis 5a de oktobro, http://esperanto-urbo.de kaj http://ic-herzberg.de

La 2-a Pakistana Junulara Kongreso de Esperanto, Lahore, Pakistano, 5a de oktobro 2014, https://www.facebook.com/events/525362537582468/

3a Junulara Somera Komuna Aranĝo (JuSKA), Jimaguayú, Kubo, 9a ĝis 12a de oktobro, Ariadna García Gutiérrez (arita_piscis14 ĉe yahoo.es)

2a Esperantista Migrado Aŭtuna (EMA), Germanio, 19a ĝis 24a de oktobro 2014 sur la migrovojo "Moselhöhenweg". http://www.esperanto.de/ema

AUTUNE, la komunaj ferioj por infanoj, familioj kaj geavoj, Esperanto-kastelo Greziljono, Grésillon, Francio, 24a de oktobro ĝis 1a de novembro, http://gresillon.org/

Konferenco pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (KAEST), Modra Harmónia, Slovakio, 13a ĝis 16a de novembro 2014, Peter Baláž (kaest ĉe ikso.net) kaj http://kaest.ikso.net/

67a GEA-Klerigado, Herzberg am Harz, la Esperanto-urbo, Germanio, 12a ĝis 14a de decembro, http://esperanto-urbo.de kaj http://ic-herzberg.de

Komuna Seminario (KS33), Ho Chi Minh urbo, Vjetnamio, 26a ĝis 28a de decembro, vejo.vjetnamio ĉe gmail.com aŭ https://www.facebook.com/events/638292086208245

Festi jarfine proksime de Francio, Luksemburgio kaj Belgio : 13-a Novjara Renkontiĝo (NR) kaj NIS (Novjara Internacia Semajno), Bitburg, Germanio, 27-a de decembro 2014 ĝis la 3-a de januaro 2015, http://www.esperantoland.org/nr/#nr

6a JES, Weißwasser, Germanio, 28a de decembro 2014 ĝis 4a de januaro 2015, https://www.facebook.com/junularaesemajno kaj baldaŭ en http://jes.pej.pl

Pliaj renkontiĝoj haveblas en la Internacia Kalendaro: http://www.eventoj.hu